

Enhavo

1	Novaj eldonaĵoj	2
1.1	“The Quest for a Universal Language” (Paolo Rossi)	2
1.2	“Languages in the Twenty-First Century” (Humphrey Tonkin/ Timothy Reagan)	3
1.3	Pri Eŭropo kaj lingvaj problemoj en polaj eldonaĵoj (Zbigniew Galor)	4
1.4	Pri la rilatoj inter lingvo kaj kulturo (Aleksandro Melnikov).....	5
1.5	“Artificial Descendants of Latin” (Alan Libert)	7
1.6	Beiheft 11: Aktoj de la 13-a konferenco de GIL (2003)	8
1.7	Festlibroj.....	8
1.7.1	Festlibro por Heidemarie Salevsky	8
1.7.2.	Festlibro por Fernando de Diego (I. kaj R. Haupenthal)	9
1.7.3	Festlibro por Adolf Burkhardt (I. kaj R. Haupenthal).....	10
1.8	Novaj Esperanto-Dokumentoj el Rotterdam	10
1.9	La klasika verko de Drezen en rusa represo – sed malnoviĝinta	10
2	Historiografio de GDREA.....	11
2.1	La aktoj kaj la biblioteko – savitaj.....	11
2.2	Esplorgrupo kaj ĝiaj rezultoj – kompletiga bibliografio de GDREA	11

1 Novaj eldonajoj

1.1 Paolo Rossi: “The Quest for a Universal Language”

Rossi, Paolo (2000): *Logic and the Art of Memory. The Quest for a Universal Language*. (Translated with an Introduction by Stephan Clucas). Chicago: The University of Chicago Press, ISBN 0-226-72826-9, 333p.

1.2 “Languages in the Twenty-First Century” (Tonkin/Reagan)

Tonkin, Humphrey/ Reagan, Timothy (eds. 2003): *Language in the Twenty-First Century. Selected papers of the millennial conferences of the Center for Research and Documentation on World Language Problems, held at the University of Hartford and Yale University.* Amsterdam/ Philadelphia: John Benjamins, 209 p., ISBN 90 272 2832 9

1.3 Pri Eŭropo kaj lingvaj problemoj en polaj eldonaĵoj

La Katedro pri Sociaj Sciencoj de la Agrikultura Universitato en Poznań eldonadas serion de libroj titolitan “Eŭropo - Patrujo – Nacio”. Laŭ la iniciato de *d-ro Zbigniew Galor*, laboranto ĉe la Katedro, inter ili ankaŭ estas esperantistaj aŭtoroj.

Temas pri jenaj volumoj:

1. B. Goryńska-Bittner, J. Stępień (Red., 1999): *Jaka Europa ma przyszłość?* [Kia Eŭropo havas estontecon?] Poznań: The Department of Social Sciences August Cieszkowski Agricultural University, 151 p.:

- Helmar G. Frank: *Europa jako wspólnota językowa. Impulsy dla diagnozy i terapii* (Eŭropo kiel lingvo-komunumo. Impulsoj por diagnozo kaj terapio. El la germana trad. Arkadiusz Purgacz), p. 28-57.

2. Z. Galor, B. Goryńska-Bittner (Red., 2000): *Stara i Nowa Europa. Własność - Rynek - Osobowość* (Malnova kaj Nova Eŭropo. Proprieto – merkato kaj personeco), Poznań: The Department of Social Sciences August Cieszkowski Agricultural University, 267 p.

- Věra Barandovská-Frank: *Europeistyka - nauką o Nowej i Starej Europie. Europamflet* (Eŭrologio – scienco pri la Nova kaj Malnova Eŭropo. Eŭropa pamfleto. El Esperanto trad. Zbigniew Galor), p. 61-77.

3. B. Goryńska-Bittner, J. Stępień (Red., 2001): *Spółeczeństwo obywatelskie w procesie integracji europejskiej* (La civila socio en la procezo de eŭropa integriĝo), Poznań: The Department of Social Sciences August Cieszkowski Agricultural University 235 p.

- Zlatko Tišljar: *Ideologia europejska: tożsamość narodowa a tożsamość europejska* (Eŭropa ideologio: nacia kaj eŭropa identeco. Trad. el Zbigniew Galor), p. 100-116.

- Michael Cwik: *Język a obywatelstwo europejskie* (Lingvo kaj eŭropa rajtaro de civitanoj. El la angla trad. Zbigniew Galor), p. 146-162.

4. B. Goryńska-Bittner (Red., 2004): *Inna Europa? (Ĉu alia Eŭropo?)*, Poznań: The Department of Social Sciences August Cieszkowski Agricultural University, 265 p.

- Detlev Blanke: *Języki w Unii Europejskiej i Niemcy o równouprawnieniu... własnego języka* (Lingvoj en Eŭropa Unio kaj la germanoj pri samrajteco...de ilia propra lingvo. Trad. el Esperanto Zbigniew Galor), p. 51-72

- Ilona Koutny: *Komunikacja międzykulturowa w Europie: angielski i esperanto jako alternatywne środki komunikacji* (Interkultura komunikado en Eŭropo: La angla kaj Esperanto kiel alternativaj komunikiloj. El Esperanto trad. Zbigniew Galor), p. 73-95

Informojn donas: D-ro Zbigniew Galor; Katedra Nauk Społecznych Akademii Rolniczej im. Augusta Cieszkowskiego w Poznaniu, ul. Wojska Polskiego 28; PL-60-637 Poznań; tel. (+48) 506 458 123; (+48-61) 872-83-09, e-mail: zgalor@au.poznan.pl

1.4 Pri la rilatoj inter Esperanto kaj kulturo – libro de Aleksandr Melnikov

Aleksandr S. Mel'nikov (2004): *Lingvokult'urologičeskie aspekty planovykh meždunarodnykh jazykov (na fone etničeskich jazykov)*. Rostov-na-Dona: Izdatel'stvo Rostovskogo gosudarstvennogo pedagogičeskogo universiteta, 632 p. (Lingvokulturologiaj aspektoj de internaciaj planlingvoj sur la fono de etnaj lingvoj).

(La scienca redaktinto de la libro estas prof. A. Duliĉenko).

Jen estas ĝia mallonga dorskovrila prezento:

“Ne tiom longe antaŭe prezento de ia lingvo kiel artefarita estis io plej malbona el tio, kion eblus diri pri ĝi [...] Estante infano, mi spertis tion, kion hodiaŭ ni nomas lingvaj kontaktoj kaj kio konvinkis min pri la vaneco de la plejparto el la kritikoj direktitaj kontraŭ planlingvoj [...] mi venis al la konkludo, ke en internaciaj kontaktoj lingva komunikado estas multe pli facila kaj utila, se ĝi okazas en lingvo, kiu estas denaska por neniu el la kunparolantoj [...] Kiel diris al mi germana idisto [...] 'Esperanto - ĝi funkcias/it works!'” (A. Martinet)

Libro pri tio, kiel du “aferoj nekunigeblaj” (internaciaj planlingvoj kaj kulturo) ne nur kuniĝis, sed iĝis nedisigeblaj, kial Eo eniris 1% de idiomoj, regule kaj amase uzataj en internacia komunikado, kiel ĝi “generis” propran kulturon kaj ĝin reflektas. Pri viveco de Eo por arta kreado, pri luda komunikado kaj vortludoj en ĝi, pri specifeco de esperantista lingva personeco...

Kaj jen la libra enhavo (parenteze estas la paĝnumeroj)

Enkonduko – 8.

1. Premisoj por apero de kulture signifa funkcio ĉe aposterioraj internaciaj planlingvoj (IPL) kaj kelkaj ĝiaj manifestiĝoj en Eo – 41
 - 1.1. La plej ĝeneralaj premisoj por kulture signifa funkcio de IPL – 60.
 - 1.2. Kulture signifa funkcio de Eo, bazita sur specifaĵoj de ĝia projekta strukturo kaj reala funkciado – 93.
2. Luda komunikado kaj vortludoj kiel rimedoj de kulture signifa funkcio de IPL – 137.
 - 2.1. Luda komunikado kaj vortludoj: rolo, terminoj, bazaĵoj – 137.
 - 2.2. Fenomenoj kaj procezoj en Eo uzataj por luda komunikado – 187.
 - 2.3. Leksiko-gramatikaj premisoj por vortludoj kaj luda komunikado – 187.
 - 2.3.1. Vortludoj kaj luda komunikado bazitaj sur paronimio – 187.
 - 2.3.1.1. La „anatomio“ de paronimioj uzataj en vortludoj kaj luda komunikado – 191.

- 2.3.1.2. Tipoj de simileco vidpunkte de la morfologiaj karakterizaĵoj de priludataj paronimoj – 193.
- 2.3.1.3. Tipoj de simileco vidpunkte de kompakteco de priludataj unuoj – 199.
- 2.3.2. Vortludoj kaj luda komunikado bazitaj sur homonimio kaj polisemio – 225.
- 2.3.3. Vortludoj kaj luda komunikado bazitaj sur polisemio kaj amfibolio kondiĉita de elipsoj – 237.
- 2.3.4. Kliŝoj kaj lingvokulturemoj kiel bazo de luda komunikado en Eo – 242.
- 2.3.5. Vortludoj kaj luda komunikado bazitaj sur intence misa uzado de sinonimoj kaj antonimoj – 252.
- 2.4. Vortformadaj premisoj de vortludoj kaj luda komunikado – 254.
- 2.5. Sintaksaj premisoj de vortludoj kaj luda komunikado – 256.
- 2.6. Leksiko-gramatikaj kaj sintaksaj transformoj uzataj por vortludoj kaj luda komunikado – 258.
- 2.7. Premisoj de vortludoj kaj luda komunikado nivele de diskurso – 258.
- 2.8. Specifeco de vortludoj, luda komunikado kaj ŝercoj en Eo – 263.
- 3. Lingva personeco de la tipa «portanto de IPL» kaj interteksteco en la kulturo de la E-ista sociumo – 267.
 - 3.1. Specifaĵoj de la lingva personeco de la tipa E-isto – 290.
 - 3.2. Lingva personeco de la tipa E-isto kaj interteksteco en la kulturo de la E-ista sociumo – 326.
- 4. Elementoj de la specifa kulturo de la E-ista kvazaŭetno kaj iliaj respeguliĝoj en la koncerna lingv(a)ĵo – 355.
 - 4.1. Fonaj scioj de la E-istoj: terminoj, rezultoj de eksperimento – 355.
 - 4.2. Realioj/realaĵoj en la etnaj lingvoj kaj en Eo – 370.
 - 4.3. Temaro de la fonaj scioj de la tipa E-isto – 388.
 - 4.3.1. Scioj pri la historio kaj nuntempo de la E-movado – 388.
 - 4.3.2. Scioj el la sfero de la E-a literaturo kaj literaturologio - 429.
 - 4.3.3. Scioj el la sfero de amaskomunikiloj en Eo – 429.
 - 4.3.4. (Apud)Lingvistikaj scioj ligitaj kun Eo – 463.

- 4.3.5. Scioj el la kampo de interlingvistiko – 479.
- 4.3.6. Scioj pri eminentaj E-instruistoj kaj la plej sukcesaj metodoj de E-instruado – 482.
- 4.3.7. Scioj pri la simboloj de la E-movado – 485.
- 4.4. Manieroj respeguli la specifan kulturon de la E-ista sociumo en la lingvo kaj diskursoj en Eo – 502.
- 4.5. Fontoj kaj mekanismo de la formado de esperantonimoj - 514.
Konkludo – 522.

Suplemento 1. La funkcia matrico de Eo – 532.

Suplemento 2. La Praga manifesto de la movado por la internacia lingvo Eo – 560

Suplemento 3. La rezolucioj de la Ĝeneralaj konferencoj de Unesko dediĉitaj al Eo – 562.

Suplemento 4. Konciza laŭtema vortareto de esperantonimoj – 563.
Literaturo – 589.

Notoj: esperantonimo – leksemo, kiu nomas fenomenon/objekton/homon ktp., kiu respegulas la specifan kulturon de la esperantista sociumo

(Ĉiuj tradukoj de A.S.Melnikov. La libro estas mendebla rekte ĉe li: aleks-meln@mail.ru)

1.5 Alan Libert: “Artificial Descendants of Latin”

Ni jam prezentis du librojn de la vaste nekonata interlingvisto Alan Libert: IpI 43 (*A Priori Artificial Languages*) kaj IpI 44 (*Mixed Artificial Languages*). Libert interesiĝas ĉefe pri la strukturo kaj detaloj de malnovaj projektoj, apenaŭ konsideras la sociologian flankon de la problemo. Lia aliro al la vasta interlingvistika fakliteraturo ŝajnas limigita, kvankam li ankaŭ uzas materialojn el la reto.

Dr. Alan Libert estas lekciisto pri lingvistiko en la aŭstralia universitato de Newcastle:
Alan.Libert@newcastle.edu.au

Libert, Alan (2004): *Artificial Descendants of Latin (Languages of the World 31)*. München: Lincom Europa, ISBN 3 89586 818 3, 140p.

Resumo sur la kovrilo de la libro:

Among the hundreds of artificial languages created in recent centuries are a fair number of modified versions of Latin and languages which have taken many elements from Latin. These diverge in varying degrees and ways from Classical Latin. This book is a survey of such projects. The languages examined include Communia, Latino sine Flexione, Linguum Islianum, SPL and Universal-Latein. An introduction presenting the languages is followed by chapters on phonetics, lexicon, morphology, syntax, and semantics.

1.6 Beiheft 11: Aktoj de la 13-a konferenco de GIL (2003)

Blanke, Detlev (2004, Red.): *Spracherfindung – Sprachplanung – Plansprachen. Beiträge der 13. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 28.-30. November 2003 in Berlin.* Interlinguistische Informationen. Beiheft 11. Berlin: GIL, 158 p., ISSN 1432-3567

Jen la enhavo de la grandparte germanlingva libro:

<i>Detlev Blanke :</i>	Antaŭparolo
<i>Věra Barandovská-Frank:</i>	Planlingvoj kiel parto de la lingvo-planado
<i>Sabine Fiedler:</i>	Planlingvo kaj lingvo-ludo: pri la noviga-krea lingvo-uzo en Esperanto
<i>Martin Haase:</i>	Lingvo-purismo en la eŭska
<i>Rudolf-Josef Fischer:</i>	Lingvoŝanĝo en Esperanto, ĉe la ekzemplo de la sufikso –i-
<i>Andreas Emmerich:</i>	Tradukproblemoj ĉe la ekzemplo de la romano de Tolkien "La Mastro de la Ringoj"
<i>Bertilo Wennergren:</i>	Esperanto im Internet / Esperanto en la Interreto (dulingva teksto)
<i>Cornelia Mannewitz:</i>	Kio la germana estas por societo? Ekstera rigardo al la "Societo por Germana Lingvo"
<i>Zé do Rock:</i>	Reise Um Di Welt In 10 Seiten (Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo sur 10 paĝoj, eseo lingvo-luda per/pri la germana lingvo de furora brazil-germana verkisto)
<i>Prezento de la aŭtoroj</i>	
<i>Enhavo de la Aktoj 1-10.</i>	

Se la esperantigita enhavtabelo vekos vian intereson kaj se vi kapablas legi la germanan, bv. rigardi la germanlingvan enhavon de ĉiuj aperintaj aktoj ĉe www.interlinguistik-gil.de/beihefte.html aŭ kontaktu la redaktoron.

1.7 Festlibroj

1.7.1 Festlibro por Heidemarie Salevsky

D-rino Heidemarie Salevski fariĝis 60-jara la 20-an de aŭgusto 2004. Ŝi estas internacie renoma slavistino kaj profesorino pri tradukscienco (translato-scienco) en la Faka Altlernejo Magdeburg-Stendal.

Ŝi estas membro de Societo pri Interlingvistiko (neesperantisto) kaj plurfoje parolis kaj publikigis pri planlingvoj kaj aparte pri Esperanto.

Prof. Salevsky aparte bone konas la tradiciojn de la tradukscienco en la slavaj landoj, sed ankaŭ laboris kiel gastprofesoro en Aŭstrio kaj Usono. Ŝi jam kelkfoje donis al interlingvistoj la eblecon prelegi en konferencoj aŭ simpozioj, organizitaj de ŝi.

Pri la pozicio de Esperanto en ŝia lasta ampleksa verko bv. relegi en IpI 43, p.14.

Jen tri el ŝiaj eseoj:

Salevsky, Heidemarie: *Sind Translationsmodelle auch anwendbar? (Zu einer Gretchenfrage der Translationswissenschaft)*. In: Becker, Ulrich (Hrsg.): *Translation in Plansprachen*. Beiträge gehalten auf der 5. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 24.-26. November 1995 in Berlin. *Interlinguistische Informationen*, Beiheft 1, 1996, p. 7-11

Salevsky, Heidemarie: *Sprachliche Gleichberechtigung in der EU – eine Chance für Esperanto? (Ein Kongreßbericht, ein Pilotprojekt und einige Hintergründe)*. In: *TEXTconTEXT 14*, Neue Folge 4 (2000), Nr. 3, p. 249-266

Salevsky, Heidemarie: *Läuten die Abendglocken auch in Esperanto? (Zum Problem der Übersetzbarkeit mit Blick auf eine Plansprache)*. In: Fiedler, Sabine ; Liu, Haitao (Hrsg.): *Interlingvistikaj Studoj. Interlinguistische Studien. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke*. Dobřichovice : KAVA-PECH, 2001, p. 433-454

Okaze de ŝia jubileo disĉiploj kaj kolegoj dediĉis al ŝi jenan festlibron:

Müller, Ina (2004, Hrsg.): *Und sie bewegt sich doch...Translationswissenschaft in Ost und West. Festschrift für Heidemarie Salevsky zum 60. Geburtstag*. Frankfurt a. M. et al.: Peter Lang, 424 S., ISBN 3-631-52497-8

En ĝi troviĝas jenaj tri interlingvistikaj kontribuoj:

Blanke, Detlev: Zu einigen Funktionen von Übersetzungen im Esperanto, p.53-70

Blanke, Wera: Plansprachliche Anregungen für Terminologen – Wüster, Drezen, Warner - eine Skizze, p. 71-85

Schubert, Klaus: Interkulturelle Sprache, p. 319-331

1.7.2 Festlibro por Fernando de Diego

Hauptenthal, Irmi/ Hauptenthal, Reinhard (Hrsg., 2003): *Klaro kaj Elasto. Fest-libro por la 80-a naskiĝ-tago de Fernando de Diego 1919 – 2 novembro – 1999*. Schliengen: Edition Iltis, 422 S., ISBN 3-932807-26-X.

1.7.3 Festlibro por Adolf Burkhardt

Hauptenthal, Irmi/ Hauptenthal, Reinhard (Hrsg., 2004): *Esperante kaj Ekumene. Fest-libro por la 75-a naskiĝ-tago de Adolf Burkhardt*. Schliengen: Edition Iltis, 368 S., ISBN 3-932807-43-X

La libro estas havebla ĉe Bernhard Eichkorn,
Romäusring 20, DE-78050 Villingen-Schwenmingen

1.8 Novaj Esperanto-Dokumentoj el Rotterdam

En la serioj de “Esperanto-Dokumentoj”, kiujn eldonas UEA, ĝis nun aperis en la angla 48 kaj en la franca 29 titoloj.

La lastaj eldonaĵoj (ĝis fino de 2004) estas:

Piron, Claude (2004): *Communication linguistique. Étude comparative faite sur le terrain. Documents sur l’Espéranto 29 F*, Rotterdam: UEA, 28 p.

Piron, Claude (2004) : *The hidden perverse effects of the current system of international communication. Esperanto Documents 48A*, Rotterdam: UEA, 15 p.

Blanke, Detlev (2004); *Interlinguistics and Esperanto studies: Path to the scholarly literature. Esperanto Documents 47 A*, Rotterdam: UEA, 40 p.

(La esperantan version ni prezentis en IpI 48-49. Krome aperis eldonoj en la ĉeĥa, germana kaj ĉina).

1.9 La klasika verko de Drezen en rusa represo – sed malnoviĝinta

En Moskvo aperis represo de la lasta ruslingva eldono (1928) de la verko pri la historio de la mondolingvo de *Ernest Drezen*.

Ĝi ankaŭ enhavas la antaŭparolon de la siatempa akademiano *N. Marr*. De Marr estis fondita komplete spekulacia kaj absurda teorion pri la estiĝo, parenceco kaj evoluo de lingvoj, la t.n. “marismo”. Ĝin ĝis fino de la 40-aj jaroj subtenis *Stalin* kaj estis ĝi unu el la ĉefaj kialoj por certa stagnado de la soveta lingvo-scienca kaj persekuto de alipensaj lingvistoj. La antaŭparolo de Marr siatempe al la libro donis certan prestiĝon.

Tiun ĉi rusan eldonon esperantigis *Nikolaj Hohlov* kaj *Nikolaj Nekrasov*. La dua eldono de la esperanta versio aperis 1931 en Leipzig (EKRELO) kaj fariĝis mondkonata. Antaŭ presado ĝin sendube ankoraŭ trarigardis Drezen mem.

Sergej N. Kuznecov reproduktis la eldonon de 1931, forigis multajn erarojn, aldonis dokumentojn kaj abunde notojn. La verko ankaŭ enhavas ampleksan eseon de Kuznecov pri Drezen kaj lia verko. Li ankaŭ prezentas la kvar rusajn eldonojn de la Historio de la Mondolingvo (daŭre prilaboritaj kaj kompletigitaj de Drezen mem, fakte de skizo al libro):

Drezen, E[rnest] (1991): *Historio de la Mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado*. (Kvara Esperanto-eldono. La unuan Esperanto-eldonon (1928-1930) tradukis kaj prilaboris N.[ikolaj]

Hohlov kaj N.[ikolaj] Nekrasov. La kvaran Esperanto-eldonon redaktis kaj komentis S. Kuznecov.) Moskvo: Eldonejo Progreso, 454 p.

Fakte, por la scienca laboro nur taŭgas la eldono, kiun prilaboris Kuznecov.

Des pli mirinda estas la fakto, ke aperis represoj de la menciita rusa eldono:

Drezen, E. (2004: *Za vseobčim jazykom. Tri veka iskannij*. Izd. 2., 272 p.

En la reto mi ne trovis informojn pri eldonloko, eldonejo ktp., sed ja la prezo: 12,90 EUR,

Mi esperas, ke rusaj esperantistoj okupiĝos pri tiu surprizaĵo, kiu nur havas historian valoron.

D. Blanke

2 Historiografio pri GDREA

2.1 La aktoj kaj la biblioteko – savitaj

“Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR”, konatiĝinta per la mallongigo GDREA (= GDR-Esperanto-Asocio) kaj kun la oficiala germana nomo “Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR”), ekzistis de marto 1965 ĝis majo 1991 (unuigita kun Germana Esperanto-Asocio).

La kompleta arkivo de GDREA estas savita kaj ekzistas kiel parto de la arkivo de Kulturligo. Kaj tiu arkivo siavice troviĝas en “Stiftung Archive der Parteien und Massenorganisationen der DDR im Bundesarchiv”, SAPMO (= Fondaĵo arkivoj de partioj kaj amasorganizaĵoj de GDR en la Federacigermania Arkivo). La arkivego SAPMO troviĝas en Berlino kaj antaŭnelonge transprenis la kompletan bibliotekon de GDREA (ĉ. 2100 titoloj kaj sama kvanto de parte nebinditaj gazetoj).

Ekzistas katalogo kiel bindita printaĵo kaj kiel kompaktdisko:

Lemke, Thorsten/Ludewig, Monika (1989/2003): *Bibliothek des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR. Alphabetischer Katalog (Autoren-Verzeichnis)*. (Erarbeitet von Thorsten Lemke (1989) und als elektronische Datei erstellt von Monika Ludewig (2003). Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, 190 p. (same kiel Kompaktdisko)

Pri la biblioteko de GDREA ĉe SAPMO informas:

www.bundesarchiv.de/aufgaben_organisationen/abteilungen/sapmo/01097 (Pri la enhavo kaj grafikaĵo sole respondecas SAPMO).

2.2 Esplorgrupo kaj ĝiaj rezultoj – kompletiga bibliografio de GDREA

En la jaro 1997 kelkaj iamaj aktivuloj de GDREA fondis esplorgrupon, kies celo unuavice estis sekurigi materialon kaj prilabori diversajn subtemojn de la historio de GDREA.

La fina celo estas verki libron kiom eble plej bone dokumentitan. Ĝis fino de 2004 la laborgrupo havis 11 kunsidojn en Berlino. Aperis 15 cirkuleroj (sume 330 p.) kun organizaj informoj kaj diversaj studoj.

Elektado de la studoj, troveblaj en la cirkuleroj, aperis en Blanke 2003a (vidu la suban bibliografion).

La pretigo de materialoj plimal pli finiĝis en 2004. En IPI 37 (p. 12-15) aperis bibliografio pri la sistemo (2001) ekzistantaj materialoj.

Ĝin ni kompletigas jene: (* = la titoloj aĉeteblas)

*Beau, Rolf (2004): Esperanto in Leipzig - Internationale Veranstaltungen. Mitteilungsblätter und Rundschreiben. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, 45 p., 3 EUR

*Bendias, Torsten (2003): Esperanto-Jugendgruppen in der DDR. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR (AGG), 61 p. 4 EUR

Blanke, Detlev (1999): Fuŝa bildo pri komplika afero. En: Heroldo de Esperanto 75(1999)3, p. 2 (same en: Le Travailleur Esperantiste, 1999, N-ro 241, p. 13-14), [Reago al artikolo de Stan Keable „Esperanto. Hurrican of persecutions”. En: Weekly Worker, Nr. 272, January 21/1999]

Blanke, Detlev (2002): Zur Einführung oder Peter Levsen outet sich und gibt einige Fakten preis. En: Levsen/Lindner 2002, p. 7-21 (same en: AGG-Rundbrief 13(2/02), p. 17- 26).

*Blanke, Detlev (2003a, Red.): Beiträge zur Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR (von Rolf Beau, Ulrich Becker, Torsten Bendias, Dirk Bindmann, Detlev Blanke, Wolfgang Both, Rudolf Burmeister, Till Dahlenburg, Rainer Knapp, Linde Knöschke, Helmut Krone, Max Hans Jürgen-Mattusch, Monika Ludewig, Achim Meinel, Werner Pfennig, Marcus Sikosek, Janos Sipos, Fritz Wollenberg). Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, 203 p., 8 EUR

Blanke, Detlev (2003b): Esperanto kaj socialismo? Pri la movado sur la ‘alia flanko’. En: “Sennacieca Revuo” N-ro 130-131 (2002-2003), p. 15-28 (rigardu ankaŭ la korektojn aperintajn en “Sennaciulo” 130-131). Krome en: Le Travailleur Esperantiste Nr. 264/2002 (Septembro-Oktober), p.9-14; Nr. 265/2003 (Januaro), p. 5-8; Nr. 266 (Majo/2003), p. 7-12; Nr. 267 (Julio/2003), p. 5-8; Nr. 268 (Decembro/2003), p. 5-10.

Blanke, Detlev 2003c): Traditionen des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes (1911-1933) und ihre Rolle im Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR (1965-1991). En: Zaib, Volker (Hg., 2003): Kultur als Fenster zu einem besseren Leben und Arbeiten. Festschrift für Rainer Noltenius. (Veröffentlichungen der Literaturkommission für Westfalen, Band 9). Bielefeld: Aisthesis Verlag, (752 p.), p. 605-644

*Blanke, Detlev (2004): Esperanto kaj socialismo? Pri la movado sur la ‘alia flanko’. New York: Mondial, 64 p., (Prilaborita versio de Blanke 2003b)

*Burmeister, Rudolf (2004): Esperanto im Bezirk Karl-Marx-Stadt 1965 – 1990. Teil 1: Die Esperanto-Gruppe in Karl-Marx-Stadt. 200 p./ Teil 2: Die Bezirksorganisation des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, 200 p. (kun indekso pri lokoj kaj personoj de Ino Kolbe). 12 EUR

Dahlenburg, Till (2001): Politika aktualeco en Esperanto-lernolibroj de orientgermanaj aŭtoroj. En: Fiedler, Sabine/ Liu, Haitao (2001, Hrsg.): Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Studien zu Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag. Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH, S. 565 – 584

*Deutscher Arbeiter-Esperanto-Bund. Bezirk Erzgebirge-Vogtland. Protokollbuch (1913-1933. Abschrift. Mit einem Vorwort und Einführungen von Detlev Blanke sowie einem Orts- und Personenregister von Ino Kolbe. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, 2004, 28 +X+112+9 p., (Tekstoj parte en Esperanto), 8 EUR

Kolbe, Ino (2001a): Unu tag-nokto en Dresdeno. In Saksa Kuriero 3/2000, S. 3-4. Nachdruck in AGG-Rundbrief 11(3/2001), p. 10-11

Kolbe, Ino (2001b): Mein Leben mit und für Esperanto. Leipzig: Autorin (Manuskript), 130 p. (ill.)

Kolbe, Ino (2002a): Mein Leben mit und für Esperanto. Leipzig: Autorin (Manuskript), 2. korektita dua eldono, 120 p. (ill.)

Kolbe, Ino (2002b): Zum Inhalt der Esperanto-Folgen in „Der Morgen“ – Verzeichnis der Überschriften. En: Levsen/Lindner 2002, S. 24-39

Kolbe, Ino (2003): Mia vivo kun kaj por Esperanto. Leipzig, Man., 50 p., 2 Foto-Tafeln, Anhang

Kolbe, Ino (2004a): Liste der Bezirksvorsitzenden. En: AGG-Rundbrief 14 [1/2004], p. 13-14

Kolbe, Ino (2004b): Gedichte in „der esperantist“ Nr. 1-164 (1964-1990). En: AGG-Rundbrief 14 [1/2004], p. 17- 20

Krone, Helmut (2002): Die Wiedervereinigung der Esperantisten in Berlin aus heutiger Sicht. En: AGG-Rundbrief 13 (2/2002), S. 47-51 (same en: Blanke 2003a)

*Lemke, Thorsten/Ludewig, Monika (1989/2003): Bibliothek des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR. Alphabetischer Katalog (Autoren-Verzeichnis). Erarbeitet von Thorsten Lemke (1989) und als elektronische Datei erstellt von Monika Ludewig (2003). Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR (AGG), 190 p. (same sur KD), 8 EUR

*Levsen, Peter/ Paul Lindner (2002): Die Esperanto-Serie in "Der Morgen" 1965 - 1990. Zur Veröffentlichung vorbereitet von Ino Kolbe und Monika Ludewig. 3 A4-Hefte, zusammen 600 p. + Anlagen (same sur KD), 18 EUR.

*Lewien, Werner (2001): „La gazetaro pri ni“. Esperanto in der Presse der DDR. Eine Auswertung von Materialien aus „der esperantist“. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR , 56 p., 4,50 EUR

Ludewig, Monika (2002): Ein großes Erstaunen...En: Levsen/Lindner 2002, p. 22-23

Mattusch, Max Hans-Jürgen (2002): Esperanto an der Universität Halle. En: AGG-Rundbrief 12[1/2002], p. 7-8 (same en: Blanke 2003a)

*Pfennig, Werner (2002): I Die Esperanto-Bewegung in den Strukturen des Kulturbundes aus der Sicht des Bezirksvorstandes GDREA Neubrandenburg. II Über zentrale und bezirkliche Seminare zur Qualifizierung der Zirkelleiter und ehrenamtlichen Leitungen durch GDREA. Ein Arbeitsmaterial. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-

Verbandes im Kulturbund der DDR (AGG), 54 p. + Anlagen (Vorbemerkung von Detlev Blanke, Personenregister von Ino Kolbe), 5 EUR

Pfennig, Werner/ Raabe, Eckart/ Raabe, Thomas (1998): 20 jaroj SEFT. Kroniko 1978 – 1997, 142 p., 16 p. Fotos (Man.)

Pfennig, Werner/ Raabe, Eckart (2002): 25 jaroj SEFT. Kroniko 1978 – 2002, 239 p., Fotos (Man.)

SoLo (Siegfried Linke): Forgesita jubileo de ELSA. En: Panoramo-Info (Sciiga letero por la Esperantistaro en Saksio-Anhaltio) 9(2000)4. Nachdruck in: AGG-Rundbrief 12 [1/2002], p. 9

Treder, Julia (2004): *Esperanto in Halle. Die Geschichte der Plansprache im Kontext der gesellschaftlichen und politischen Entwicklung*. Halle-Wittenberg: Martin-Luther-Universität, Allgemeine Sprachwissenschaft, 113 p., magistra disertacio (pri la historio de Esperanto en la saksa urbo Halle, bone dokumentita).

Wollenberg, Fritz (2001a): Eine Chronologie zur Geschichte des Esperanto in Berlin (Resümee des Vortrags während des 7. AGG-Treffens am 24.2.01). En: AGG-Rundbrief 11 (2/2001), p. 7-10 (same en: Blanke 2003a)

Wollenberg, Fritz (2001b): Erfahrungen bei der Erforschung und Darstellung der Berliner Esperanto-Geschichte. En: Fiedler, Sabine/ Liu, Haitao (2001, Hrsg.): *Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Studien zu Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag*. Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH, p. 478 – 503

*Wollenberg, Fritz (2002a): Chronik zur Geschichte des Esperanto in Ostberlin 1945-1991. Ein Arbeitsmaterial. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR (AGG), 85 p. (Vorbemerkung von Detlev Blanke, Personenregister von Ino Kolbe), 6 EUR

Wollenberg, Fritz (2002b): Esperanto-Schüler-Arbeitsgemeinschaften in GDREA. En: AGG-Rundbrief 13(2/2002), S. 51-53 (same en: Blanke 2003a)

Kompaktdiskoj

*Levsen, Peter/ Paul Lindner (2002): Die Esperanto-Serie in "Der Morgen" 1965 - 1990. Zur Veröffentlichung vorbereitet von Ino Kolbe und Monika Ludewig. 3 A4-Hefte, zusammen 600 S. + Anlagen. Technische Herstellung: Helmut Krone, 12 EUR

*Paco. Alle DDR-Ausgaben von 1966 bis 1989. Ĉiuj GDR-eldonoj de „Paco“ 1966-1989. Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, 2004. Technische Herstellung: Helmut Krone, 4 EUR

*Lemke, Thorsten/Ludewig, Monika (1989/2003): Bibliothek des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR. Alphabetischer Katalog (Autoren-Verzeichnis). Erarbeitet von Thorsten Lemke (1989) und als elektronische Datei erstellt von Monika Ludewig (2003). Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, 4 EUR

*der esperantist. 1965 – 1990. Kun registroj kaj indeksoj de Ino Kolbe kaj Linde Knöschke. Teknika pretigo de Helmut Krone. 3 KD, 15 EUR.

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED)
ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederl. www.esperantic.org
Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633,
fakso: ++ 49-30-54 56 742, dblanke.gil@snafu.de. Mendojn oni direktu nur al UEA,
kontribuojn nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur diskedo. Artikoloj sen indiko pri
aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-
ekzempleron. Bibliografiatas ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.
